

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Vera Payne

PLENUMITA 16/08/2018 Tricentokdeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)

SENDITA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur kun la dekaj eldonoj



Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj Ctrl+klaku ligojn por kapabligi la malfermon

PMEGramatiko [reta-vortaro](#) *Freelang Vortaro* [Plena Ilustrita Vortaro](#)
Esperanta Retradio [Google Translate](#) *[Pasintaj eldonoj](#)*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tog.com.au

Entute **712,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **399,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015) 87

Nun studas **302,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **11,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

<https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>


Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.”.

N.ro 41 (La Plena Analiza Gramatiko de Waringhien kaj Kalocsay) .



Oni ne havas nomon por la menciitaj tre kunecaj kombinaĵoj de verbo kun substantiva aŭ adjektiva komplemento, sed ili kune formas la Predikaton, en Esperanto la agan parton de propozicio (*sentence*). Ĉar tiaj komplementoj determinas, krom la Verbon, ankaŭ AŬ la Subjekton AŬ la Objekton de la Predikato (kaj NE la Adjektojn kiel P.A.G. erare asertas), oni nomas la komplementan parton de la kombinaĵo AŬ la Subjekta Predikativo AŬ la Objekta Predikativo. Ambaŭ estas en la Nominativo, ĉar nek Objekto nek Prepozitivo. Por pli facile rekoni la predikativojn, oni ĉiam povas meti “esti” (aŭ “estante”) antaŭ la Predikativon, eĉ se ĉi lasta estas participo: “Mi jam estis (esti) manĝinta”

Marcel Leereveld.



Malfacila gramatiko.



Min tre interesas legi viajn elsendaĵojn. Mi strebas kompreni la artikolojn pri gramatiko. Kelkfoje mi kredas ke mi komprenas la punktojn kaj tiam mi povas uzi tiujn ideojn en mia propra skribo. Mi estis studanta tekston en Jesaja 5:20 kaj mi ne komprenas kial la akuzativo estas necesa en tiu frazo. Jen la frazo, " **Ve al tiuj, kiuj la malbonon nomas bono kaj la bonon malbono, kiuj mallumon faras lumo kaj la lumon mallumo.** "

Mi esperas ke iu povas klarigi al mi kial la akuzativo estas uzita tiel.

Dankon.

Sendita de via samideano **Vere Williams**.



KLARIGOJ AL VERE.



1e. Kial estas malfacile kompreneble, ke en ĉiu el la kvar frazoj unu parto estas akuzativo kaj alia parto nominativo? Kial ne ambaŭ partoj estas akuzativo aŭ nominativo? Respondo: Ĉar en ĉiu frazo uzatas nebezonata predikativo.

2e. Kion la frazoj signifas en simplaj senpredikativaj vortoj? Jen: **Ve al tiuj kiuj diras ke la malbono vere estas bono kaj ke la bono vere estas malbono kaj ke la mallumo vere estas lumo kaj ke la lumo vere estas mallumo.** Aŭ eĉ pli simple (sed tiam la biblio fariĝus tre maldika): **Ve al la mensoguloj.**

3e. Se oni donas nomon al ĵusnaskito, oni nomas la ĵusnaskiton. Nomi estas transitiva verbo kaj havas Gramatikan Objekton kiu ja ricevas la akuzativon. En la frazoj oni donas nomon al malbono kaj al bono kaj al mallumo kaj al lumo. Oni do nomas la malbonon kaj la bonon kaj la mallumon kaj la lumon, ĉiuj en la akuzativo ĉar estante Objektoj de "nomi" kaj de "fari". Kaj kiel oni nomas kaj faras la aferojn? Per la jenaj vortoj: Oni (= kiuj) **unue** nomas la malbonon esti bono, (= ricevi la nomon "bono"), **due** oni nomas la bonon esti malbono, **trie** oni faras la mallumon esti lumo, kaj **kvare** oni faras la lumon esti mallumo. Notu ke post "esti" oni uzas la nominativon: "Ŝi estas instruistino".

4e. Cetere en antaŭa A. E. mi publikigis specialan artikolon pri la Predikativoj, kiu artikolo pli klarigas la esencon de predikativoj.

Amike, **Marcel Leereveld**.

Ve al tiuj



Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

(La unua paĝo de AE havas utilajn ligojn por Esperantistoj)

[Plena Ilustrita Vortaro](#)

predikativ/o Vorto havanta la sintaksan funkcion, kiu esprimas kvaliton, kiun oni atribuas pere de verbo al subjekto aŭ al objekta komplemento; en la frazoj «la tago estas bela» «mi iĝis kapitano», «vi ŝajnas malgaja» la vortoj «bela», «kapitano», «malgaja» estas la predikativoj de la subjektoj «tago», «mi», «vi»; en la frazoj «ne nomu min reĝido» «oni ne povas supozi neekzistantaj tiujn faktojn», la vortoj «reĝido», «neekzistantaj» estas la predikativoj de la objektaj komplementoj «min», «faktojn». → [predikato](#). → [epiteto](#). **Roger Springer**



Profesoro Ronald Gates

Pri la demando de Marcel por artikolo pri Ron Gates.
En la venonta numero de ESK aperos artikolo tia.



Terry Manley



La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm.
Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita
kafo atendos vin.



La 18a de aŭgusto estas la tria sabato. Vizitantoj bonvenaj.

Roger Springer



Torquay Esperanto-Ekskurso

Dimanĉon la 21an de oktobro. Venu! Vidu AE 384on. Amike Marumi Smith




BRISBANA ESPERANTO - SOCIETO

kunvenas la trian sabaton ĉiumonate, 13:30h
Brisbane Square Biblioteko, Adelaide St.

Vizitantoj estas bonvenaj

"Sabaton, ni esperas lerni pri la Tri Landa Kongreso en Bekasi, la Lingvo Festo en Toowoomba kaj la ESPERANTO TAGO- KUNVENO ĉe la Mt Coot- Tha Botanika Ĝardeno. Ankaŭ ni diskutos pri la venonta ZAMENHOF FESTO.



Peter Danzer



(Gazetaraj Komunikoj de UEA) REZOLUCIO DE LA 103-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 103-a Universala Kongreso de Esperanto, kunvenante en Lisbono de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2018, kun 1567 partoprenantoj el 73 landoj, konfirmas la grandan aktualecon de la kongresa temo "Kulturo, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?", kiu estis traktata tra la semajno en kvar diversaj sesioj kun abunda partopreno;

notas la koincidon de ĉi tiuj diskutoj kun la 100-a datreveno de la fino de la Unua Mondmilito, kiu markis turnopunkton en la tutmondiĝa procezo;

substrekas ke la radikoj de la nuna kultura kaj lingva diskriminacio kaj soci-ekonomia sufero, spertataj de granda parto de la homaro, troviĝas en la longa historio de koloniado eŭropa kaj de aliaj landoj pasinta kaj nuntempa, kaj ke solvoj postulas la malkonstruadon de koloniecaj mondrigardoj kaj potencdividoj;

atentigas, ke la neŭtrale homa lingvo Esperanto estas potenca rimedo por mensa malkoloniado, ebliganta reciprokan interkonatiĝon kaj kompreniĝon ekster la kutimaj kadroj de privilegio kaj ekskludado;

pledas por urĝa atento al la defiaj problemoj de lingva, kultura kaj alispeca diskriminacio, sufero kaj mortigo, kunligitaj kun la detruado de la naturo kaj aliaj perfortaj tendencoj de la tutmondiĝo;

deklaras la pretecon de la parolantoj de Esperanto kunlabori en agadoj por helpi kaj protekti homojn kaj popolojn kontraŭ tia perfortado kaj kontribui al la procedo de mensa malkoloniado en ĉiuj landoj de la mondo,

kaj alvokas la aktivulojn por Esperanto al praktika solidareca agado kun la suferantoj inkluzive de migrantoj kaj rifuĝantoj laŭ la plej noblaj tradicioj de nia movado.

Sendita al AE per **Katja Steele**



Murdoj en mia ĝardeno.



MI MURDIS MISPLANTOJN, FIHERBOJN.

La ĵusajn semajnojn mi murdis, aŭ penis murdi, centojn da misherberoj. Precipe la fiajn, kvankam manĝeblajn, vagtradeskantiojn, antaŭe en la angla nomitaj “vagantaj judoj”, kiel la “holanda kuraĝo” kaj la “francaj leteroj”, kaj la “germana morbilo”, sed nun nomataj en la angla “vagantaj tradoj”, *wandering trads*, pro la latina “*Tradescantia*”. Estas ege malfacila, ekstermi ilin, ĉar ĉiu planto, ĉe murdoprovo, rompiĝas en dekon da apartaj plantetoj. Kaj post la murdopeno ili pluvivas almenaŭ unu jaron ekster la grundo, t. e. ili bezonas jaron por morti. Sed mia mortigo estas murdo, ĉar ili estas vivantaĵoj kaj havas senton. Ili sentas ke oni murdas ilin, kaj pro la sento decidas tuj rompiĝi. Ili sentas ankaŭ la temperaturon kaj la sunradiojn, kaj ili flaras en la grundo kie troviĝas akvo. Aliaj plantoj eĉ sentas aŭ vidas, per la alteco de la suno, kiu estas la sezono. Do ĉar ili estas vivantaj, kaj ĉar ili sentas, mi kiel vegetarano ne manĝu ilin, nek aliajn legomojn. Mi manĝu nur la mortintajn plantojn, kiel faras la vermoj, aŭ mi manĝu erigitan rokon kun iom da salo, kaj trinku puran akvon.

M. L.

ONI ANKORAŬ NE AKCEPTIS MIAN PROPONON, ke la registaro ŝanĝu la tutvivan geedziĝon al kvinjara geedziĝo por ĉiuj, plilongigebla ĉiufoje per kvin pliaj jaroj. La celo estas, malpliigi la murdojn ŝanĝante la kulturon. En la nuna kulturo oni akceptas ke la geedziĝo estas por la tuta vivo, kaj kiam post kvin jaroj unu el la geedzoj volas ŝanĝi partneron, la alia pensas, pro la kulturo, ke li aŭ ŝi rajtas murdi la alian, aŭ la gefilojn, aŭ la amanton de la alia, aŭ la tuton. En mia kvinjara sistemo, se post kvin jaroj unu deziras ŝanĝi, ne ekzistas tialo por la alia por malakcepti tion, kaj por murdi. Kaj se kelkaj geedzoj volas kunresti pli ol kvin jarojn, nu, ili

povas decidi plilongigi la gedziĝon, eĉ ĝis eterno. Sed la nova kulturo de aŭtomata rompo forprenos la tialon por puni la rompanton aŭ rompantinon, kaj do la tialon por murdi. La murdo grandparte ja okazas pro tio ke oni kulture kaj morale kaj leĝe akceptas la devigon resti kune ĝis la morto, eĉ se ĉeestas la leĝa eblo oficiale malkuniĝi. La psiĥologia diferenco estas ja, ke nun oni devas, ofte ĉagrene, fari multan laboron por malkuniĝi, dum en mia propono oni devas agi, fari ion, por plu geedzi.

Marcel Leereveld.

ĈU LA VERBA PASIVA VOĈO, cetere neekzistanta en la Zamenhofa Esperanto, **ESTAS NECESA?**

Ege klera, en ĉi tiu kazo eĉ sufiĉe klera, membro de la melburna Esperanto-klubo asertis al mi, ke en Esperanto ni ne bezonas havi la etnolingvan verban Pasivan Voĉon, kiel en “La protestloko ŝanĝatis de la polico”. Kaj li pravis, ĉar oni povas esprimi la samon en alia maniero, en la Aktiva Voĉo. Nur en Esperanto.

Do kial li pravas? Kion esprimas la Pasiva Voĉo? Ĝi esprimas, ke oni rigardu al okazaĵo, al Aktiva frazo (= propozicio), el de la fino returne al la komenco, aŭ preskaŭ la komenco. Se en la Aktiva “La viro batis la hundon” oni unue rigardas, kaj mencias en lingvo, la aganton, la viron, kaj post tio la agon (batis) kaj post tio la suferanton, la hundon, en la Pasivo oni unue mencias la hundon kaj post tio la agon kaj post tio la viron: “La hundo batatis de la viro”. En lingvo oni ja ne povas diri la tuton samtempe, sed nur la partojn en sisekvo. En la Pasiva Voĉo ni esprimas ekzakte la saman okazaĵon, la saman bildon, sed ni unue rigardas, kaj mencias, la suferanton, la hundon. Post tio ni mencias la agon kiun ĝi suferas, “batis”. Kaj post tio eventuale la originan aganton, la viron. La okazaĵo restas ekzakte la sama, sed ni nur ŝanĝis la vicordon de la elementoj. Ni do diras “La hundon” kaj post tio la agon “batis” kaj fine la aganton “la viro”. Nur por montri ke ni vidas la saman okazaĵon en kontraŭa vicordo, ni iomete ŝanĝas la finaĵojn de la partoj, jene 1e. La hundo, nun la unua parto de la sama frazo, perdas sian akuzativan finaĵon –n, do fariĝas “La hundo”. Al la verbo, “batis”, ni donas pasivan sufikson, do “batatis”, kaj “La viro” ricevas la prepozicion “de”, do “de la viro”. Sed la okazaĵo restas ekzakte la sama. Nu, en Esperanto, sed ne en multaj etnaj lingvoj, ni rajtas meti la frazpartojn en iun ajn vicordon. Se do ni volas esprimi “La viro batis la hundon”, ni simple diras “La hundon batis la viro”. Tio plu restas la Aktiva Voĉo, sed la atento okazas laŭ la vicordo de la Pasiva Voĉo. Do ni ne bezonas la Pasivan Voĉon, sed simple ŝanĝu la vicordon de la Aktiva Voĉo, kion la etnaj lingvoj kutime ne povas fari. Jen do la solvo, kaj la tialo por nia melburna amiko esti prava.

Ŝajne, sed nur ŝajne, tio solvas la partecan problemon, ĉar ni ne plu bezonas lerni kaj uzi la verban Pasivan Voĉon, kiu en etnaj lingvoj uzas verbajn participojn, sed en Esperanto la sufikson “-ati”. Sed KAJ nia klera melburnano KAJ mi samopinias ke, bedaŭrinde, estas konsilinda tamen lerni kaj uzi la verban Pasivan Voĉon en Esperanto, pro la jenaj tialoj.

1e. Por ne malriĉigi nian lingvon ni tamen devus pluuzi la adjektivan kaj substantivan kaj adverban sufikson “-at-” por ilia Pasiva signifo, apud la Pasivaj “-it-” kaj “-ot-”.

2e. Senescepte ĉiuj nuntempaj Esperantistoj trovas ege malfacila ne plu uzi la tradician Pasivan Voĉon en Esperanto. Ĝi fariĝis parto de nia pensado, eĉ dum ni trovas ĝin malfacile lernebla kaj dum ĝi uzatis, ĝis antaŭ dek jaroj, en malĝusta formo.

3e. Ĝi en Esperanto, per nur unu vorto, “batatis”, estas multe pli logika ol tiuj de pluraj etnaj lingvoj uzantaj ofte du verbojn por unu ago.

4e. La genia Mediala Voĉo, farita per la sufikso “-iĝi”, estas tre malfacile komprenebla pro la manko de speciala sufikso en etnaj lingvoj. La uzantoj de ĉi lastaj lingvoj kutime ne konscias pri ĝi, aŭ ne scias ĝian ekziston. Konsekvence la Esperantaj lernolibroj ne aŭ neĝuste klarigas ĝin. Pro siaj etnaj lingvoj la aŭtoroj eĉ ne mencias ĝin kaj simple diras ke –iĝi = ekesti, kio ne veras. Ĉar la Mediala Voĉo estas parte Pasiva Voĉo, la kono ante ĉi lastan helpas la lernantojn pli rapide kaj pli ĝuste kompreni la Medialan Voĉon.

5e. En plej multaj lingvoj la vicordo de la partoj de frazo samas al tiu en nia observado. Ni donis nomojn al tiuj partoj depende de ilia sisekvo: Subjekto, poste Verbo, poste Objekto, kaj fine Adjektoj, kaj ni ofte, speciale en Esperanto, donas finaĵojn al la partoj pro ilia pozicio (kaj funkcio) en la frazo. Ni kutimas vidi kaj uzi tiujn finaĵojn en sia normala vicordo, nome **1e.** manko de prepozicio kaj de akuzativo por la Subjekto, **2e.** verba finaĵo por la Verbo, **3e.** akuzativo por la Objekto, kaj fine prepozitivoj aŭ adverboj por la Adjektoj. Ĉe la alternativo por la Pasiva Voĉo tiu kutima vicordo estus rompita, kaj ŝokus nin kaj la parolanton. En tiu alternativo la vicordo estas **1e.** Akuzativo, **2e.** Verbo, **3e.** Nominativo, kaj **4e.** la Adjektoj, kiel en “La hundon batis la viro hieraŭ en la parko”. Tiu vicordo estas tute nenormala por la maniero de nia pensado. Ni povus nur ege malfacile adapti tian nenormalan lingvovicordon al nia pensvicordo. Tio do malfaciligus Esperanton, kaj farus ĝin malpli simpla. Tio estus malfacile konsilebla.

Do bedaŭrinde forgesindas la alternativo por la Pasiva Voĉo, pro la funkcmankmaniero de nia menso. .

Marcel Leereveld.



“Malgrava historieto pri mia vivo” Bob Felby

Ĉapitro 16 Logas en Aŭstralio Kaj mi eklaboras en Adelajdo

Mi restis en Danujo nur 13 jarojn. Tiam mi renkontis novzelandan doktoron en la instituto H.C. Ørsted en Kopenhago. Li rakontis al mi, ke li laboras en la universitato de Adelajdo, kaj ke Adelajdo estas bonega urbo, simila al Kopenhago. Iom post iom mi decidis iri al Adelajdo por daŭrigi mian vivon tie ! Mi do elmigris al Aŭstralio, sed ne tuj. Unue mi devis iri al la aŭstralia Ambasadorejo, kie mi parolis kun diversaj aŭstralianoj. Tie estis ankaŭ aŭstralia kuracisto, kiu ekzamenis min. Li elprenis ion el tirkesto kaj forgesis fermi la tirkeston. Kiam li ekstaris, li akcidente, devas esti akcidente, batis sian genuon al la tirkesto, kaj laŭte ekkriis. Bona, eĉ bonega reklamo por kuracisto, ĉu ne ?



Ne nur mi, sed mia tuta familio volis elmigri kaj vidi la kangurojn kaj koalojn. Sed unue necesis ke ni iru al nia propra kuracisto por esti vakcinitaj kontraŭ neniu scias kio. Tiam ni devis iri al vojaĝoficejo por aĉeti biletojn. Unue ni decidis ŝipiri al Aŭstralio, sed ĉar tio daŭrus tro longe, ni decidis flugi. Mi pensas, ke ni restis ankoraŭ unu jaron en Danlando, antaŭ ol ni fine

forflugis. Kaj tamen ni ne forflugis. Unue ni iris vagonare el Kopenhago al Hoek van Holland, kaj de tie ni ŝipiris al Harwich, kaj de tie per vagonaro al Liverpool Street Station. Jam konata vojo, ĉu ne ?

Ni restis en Anglujo unu aŭ du semajnojn adiaŭante ĉiujn parencojn kaj geamikojn. Tamen subite venis la tago, kiam ni devis adiaŭi ilin serioze. Ni iris frumatene vagonare al Londono, belega Londono. Tie ni renkontis amikino de Audrey, ŝi akompanis nin aŭtobuse al la flughaveno *Heathrow*. De tie ni flugis al Singapuro, kie ni restis multajn longajn horojn. Tamen subite ni povis daŭrigi la vojaĝon al Perto. En Perto ni aŭdis ke manĝaĵlaboristoj strikas en Melburno, kaj tial estas pli bone resti en Perto unu nokton. Ni ĉiuj, t.e. la pasaĝeroj kaj laboristaro ricevis senpagan manĝaĵon kaj ĉambregon en iu hotelo multekosta. Ĉiuj hoteloj multekostas, ĉu ne?

La postan matenon post la matenmanĝado oni enmetis nin ĉiujn en aŭtobuson kaj rondveturigis nin en Perto. Tio estis tre interesa. Ni vidis homojn somere vestitaj, sed estis ja aprilo, kaj eble dum aprilo someras en Perto.

Fine la flugmaŝino pretis, kaj ni eniris ĝin. Ni flugis de Perto al Melburno, ĉar tiam Adelajdo ankoraŭ ne havis flughavenon internacian. Estis mallume, sed varme, en Melburno. Niaj du knaboj kuŝiĝis sur la plankon ĉe la pordo kaj ekdormis. Estis tre malfacile por aliaj homoj eliri el la flughaveno, ĉar la knaboj havis longajn kruojn. Mi vekis ilin kaj komencis montri al ili la belegan flughavenon.

Daŭrigota **BobFelby**



Reklamu viajn klubkunvenojn ĉi tie. Sendu la informon al rspring@tpg.com.au

Ne raportitaj kunvenoj rapide velkos el historio kaj memoro †



Mia ĝardeno inter la strato kaj la domo

Roger Springer